# Afrika Unio zorgemas pro krizo de perforto en Mozambiko



Havano, dec 27 (RHK) La prezidanto de la Komisiono de Afrika Unio (AU), Moussa Faki Mahamat, esprimis zorgon pri la perfortaj eventoj okazintaj en Mozambiko, post la ?eneralaj elektoj okazintaj la 9-an de oktobro.

Mahamat, per deklaro, sendis sian kondolencon al la viktimoj de la kolizioj inter policanoj kaj manifestaciantoj en pluraj provincoj de tiu afrika lando, post la anonco de la finrezultoj de la elektoj fare de la Konstitucia Konsilio.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/372956-afrika-unio-zorgemas-pro-krizo-de-perforto-en-mozambiko

Radio Habana Cuba